

The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



Redakcio: "Esperanto", Box 2122 T., G.P.O., Melbourne, 3001, Aŭstralio

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.
A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Rd., Lindfield, N.S.W. 2070
Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W. 2095.
A.E.A. Libro-Servo: T Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036.

N-ro 139 (219)

MELBOURNE

JUNIO-JULIO, 1975

A. E. A. HEREDIS PLI OL \$2,000 (U.S.)

LA DONACINTO: S-RO W. L. SIMPKINS

Kredeble multaj ge-esperantistoj ĉirkaŭ la aŭstralia kontinento rememoros S-anon William Lionel Simpkins, kiu, inter 1954 kaj 1970, trifoje vizitis nian landon. Li ŝajne tre alttaksis sian ĉeeston inter aŭstraliaj Esperantistoj.

Tre sana kaj vigla fervorulo, kun (aŭ eble pro) simplaj gustoj kaj modestaj bezonoj, S-ro Simpkins, post frua emeritiĝo el posteno ĉe Midland Bank, Bracknell, Berkshire Anglujo, sukcesis longe miksi kaj ĝui siajn du ŝatatajn flankokupojn — mondvojaĝadon kaj Esperanton. Kiel gastparolanto ĉe klubaj vesperoj, S-ro Simpkins povis interese rakonti pri kutimoj en aliaj mondpartoj, inkluzive Meksikon, Usonon kaj Japanujon. De tempo al tempo li ankaŭ verkis artikolojn pri siaj observoj, kaj en 1965 en la maja/junia numero de la japana gazeto "Oomoto" aperis ne nur longa artikolo verkita de S-ro Simpkins pri "Kutimoj en multaj landoj", sed ankaŭ artikolo (kun bildo) pri tiu mondvojaĝinto, kiu jam la "trian fojon vizitis la Oomoto-Centron ĉe Kameoko."

Nelonge poste en tiu sama jaro, okazis la 50-a Universala Kongreso en Tokyo, kiun S-ro Simpkins partoprenis. Kredeble aliaj aŭstraliaj kongresanoj (krom Melburnano E. E. Thompson, kies rememorigan rakonton la nuna verkanto ĵus aŭdis) renovigis konatiĝon kun tiu entuziasmo en la kadro de la Tokia kongreso.

S-ro Simpkins unue vizitis Aŭstralion en 1954. El Jajanoj li alvenis, la 28-an de julio, en Brisbano, kie lokaj Esperantistoj Bovenigis kaj gastigis lin kaj Radio-Stacio 4 QR intervjuis lin pri liaj vojaĝoj kaj pri Esperanto. Ties honorarion S-ro Simpkins malavare donacis al la loka E-Societo. Daŭriginte sian veturadon ĝis Sidnejo, S-ro Simpkins restis tie ĝis preskaŭ la fino de aŭgusto kaj "vigligis plurajn klubvesperojn per siaj rakontoj." Iel li atingis Adelajdon, kie lokaj samideanoj bonvenigis lin per speciala festvespero je la 27-a de aŭgusto, post kiam li malaperis portempe inter ne-esperantistaj amikoj.

Li reaperis je 13-a de oktobro en Melbourne, kie, laŭ peto en letero, S-ro H. Koppel jam aranĝis loĝadon ĉe la Hotelo Gatwick en St. Kilda, kaj dum sia restado en Viktorio li regule partoprenis klubvesperojn kaj plurfoje alparolis la ĉeestantojn pri siaj vojaĝoj kaj vizitoj inter alilandaj samideanoj. Dume, aro da Melburnanoj kunvenis (23/10) en la hejmo de Ges-roj Koppel por bonvenigi lin kaj, kiam okazis en la sama hejmo Novjarfesto kun la malĝojiga celo samtempe adiaŭi la familian Leereveld al Tasmanio, S-ro Simpkins denove troviĝis inter la dudeko da gastoj. Li ankoraŭ vizitis la klubojn en januaro 1955. En marto li revizitis Sidnejon antaŭ ol forlasi Aŭstralion.

Lia dua vizito en Aŭstralio komenciĝis in oktobro 1964 en Perto, kie lin intervjuis reprezentantoj de la loka gazetaro, kaj kie li restis kaj multe helpis en la instruado de Esperanto ĝis decembro. Survoje per trajno al Adelajdo li denove vizitis ne-esperantistajn amikojn, sed alvenis en Adelajdo ĝustatempe por partopreni ankoraŭ unu festvesperon je sia honoro en la hejmo de S-ino Finlayson en Kensington Park. Hazarde ankaŭ kelkaj Melburnanoj troviĝis en Adelajdo kaj partoprenis tiun feston, inter ili S-ro H. Koppel, kiu post nur ok tagoj la duanfojon renkonte bonvenigis S-ron Simpkins en Melburno kaj kondukis lin al lia antaŭa loĝejo, la Hotelo Gatwick.

Ci-foje, almenaŭ dum mallonga tempo S-ro Simpkins devis dividi la honoron kiel Gravulo kun alia mondvojaĝanto Doktorino Rosa Scolnik (el Argentino), kiu alparolis la Melburnan klubanaron je 18/1/65, kaj kiu gastis kun li ĉe la ge-Koppeloj je 21/1/65. S-ro Simpkins restis en Melburno ĝis marto, kaj, kiel antaŭe plurfoje rakontis al klubanoj siajn travivaĵojn alilande. En marto S-ro Simpkins forlasis Melburnon por iri al Nova Sud-Kimrujo, kaj denove vigligis klubvesperojn en Sidnejo kaj Manly, kie li gastis, i.a., en la hejmo de ĉiam gastama S-ino R. Carruthers. Je la 28-a de aprilo li enŝipiĝis por Japanujo kaj alvenis en Tokio la 13-an de majo 1965.

En 1969 li denove troviĝis en Aŭstralio. Li alvenis en Perto en aŭgusto kaj oni esperis, ke li restos por la Aŭstralia E-Kongreso okazonta en la sekvanta januaro, sed taŭga ŝipo sin prezentis kaj je 30/9 li forveturis al Suda Afriko.

Sekvis longa silento. Pri lia morto, ŝajne ie en Kalifornio, lia Bankestro, informis antaŭ longe, sed en letero de 14/6/1975 S-ino Catherine Schulze de la E-Infirma Centro en Kalifornio raportas:

"W. L. Simpkins mortis iam post la U.K. en Vieno (aŭg. 1970), sed ni ne scias la daton. Verŝajne li mortis en Santa Barbara, Kalifornio. Neniu Esperantisto sciis pri lia morto ĝis poste, kiam la registaraj instancoj en Imperial County komencis pritrakti la testamenton. Atestantoj por la testamento estis Esperantistoj — unu ELNA-kasisito, S-ino Peggy Linker en Walla Walla, Washington provinco.

"Li postlasis proks. \$18,000 (U.S.). La kosto por testament-pritraktado de

la registaro estis proks. \$6,000 (!) Tio lasis proks. \$12,000. El tio li lasis monon al 3 individuoj en Britujo — la plej grandajn sumojn. Al Esperanto-organizaĵoj li testamentis jene: Aŭstralia E-Asocio \$2087.95, Brit E-Asocio \$234.50 U.E.A. \$234.50, E-Ligo de Nord-Ameriko \$1,640.94. Interese estis ke la testamento estis en Esperanto, pro kio la instancoj kontaktis la delegiton en Los Angeles kaj diris ke ĝi estis 'speco de hispana aŭ portugala'. Dum 3 jaroj ni penis lerni pli precize pri lia morto sed neniu el ni sciis."

Aliflanke, S-ro Herbert Platt, sekretario de Brita E-Asocio informis ke S-ro Simpkins mortis je la 12-a de januaro 1972 kaj ke Midland Bank Trust Ltd., kiu administris lian havaĵon en Britio, petis al B.E.A. traduki la testamenton anglan.

UEA aldonis (18/6/75), ke S-ro Simpkins estis membro de tiu organizaĵo ekde 1952; fariĝis Dumviva Membro en 1959, kaj samjare fariĝis Fakdelegito por Mondvojaĝado.

Estas iom kortuŝe, ke tiu migranta Esperantisto tiom alttaksis sian kontakton kun la aŭstralia esperantistaro. Estu nia devo saĝe investi la heredaĵon, por ke ĝi NE forvaporiĝu en ĉiutagajn elspezojn de A.E.A.. La venonta kongreso estus taŭga okazo por decidi.— Fay Koppel.

OFICIALA INFORMILO

Novaj Anoj:

Strombach, S-ro S., Lenah Valley, Tas.
Jackson, S-ino M. J., Croydon, Vic.
Osterman, F-ino V. Rozelle, NSW
Wallace, Ges-roj R. & H. Croydon, NSW

Ĝenerala Fonduso:

Williams F-ino B. Camberwell, Vic. \$5.00
Simpkins S-ro W. L. ? El Centro, USA \$2087.95 (U.S.)
Howes, S-ino D. Yarram, Vic. \$5.00

Fido pri nia Asocio: Fido pri Esperanto

La supre menciita donaco meritas klarigon. Ne, ne estas respondo pro la sugesto kiu aperis en antaŭa eldono, ke nur dek cendoj semajne de ĉiu ano denove vivipovigu nian asocion. Nia A.E.A. Kotizo plialtiĝis 66%, kondukpermesiloj ĉ 500% samperiode. S-ro W. L. Simpkins, nia donacinto, ne-

konata laŭ mia registro, donacis tiun grandegan sumon per sia testamento. Li loĝis en Usono (?El Centro) kaj lia testamento skribita en Esperanto, donacis sumojn ankaŭ al BEA kaj UEA. Kvankam ni ne povas lin mem danki, tamen nia aprobo estas kaj profunda kaj sincera kaj ne nur pro la mono sed ankaŭ pro la evidenta fido pri la estonteco de Esperanto. Ĉu iu leganto lin kontis? Bonvole skribu senpere al nia redaktoro.

Nova Klubo formiĝis

Esperanto-Klubo de la Kaprikorna Marbordo.

Prez: S-ro J. B. Moore; Sek/Kas: S-ino Patricia Murphy, Caravan Park, Emu Park, 4703.

Ni ege gratulas ĉiun koncerninton.
31/5/1975. Russ Baxter, Sek.



These two congresses will be held at Queen's College of Melbourne University. The 20th Australian Esperanto Congress will take place from the 2nd to the 4th of January, 1976 and the First Pacific Esperanto Congress from the 4th to the 10th of January, 1976.

Congress Fees: \$11; Pensioners, Students: \$6. Send your room reservation (\$10 Deposit) and Congress Fee to "ESPERANTO CONGRESS", Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001 and enclose a stamped, addressed envelope for your receipt.

Sixth List of Congress Members:

99. Mrs. P. De Cleene, Auckland N.Z.
100. Mrs. L. Greig, Masterton, N.Z.
101. Mr. Les Scott, Manly, NSW.
102. Mrs. J. Lehane, Toowoomba, Q'ld.
103. Miss C. Jeffers, Melbourne.
104. Mr. R. S. P. Reed, Melbourne
105. Mrs. E. Reed, Melbourne.
106. Mr. G. Carlton, Sacramento, USA
107. Mrs. R. Carruthers, Balgowlah, NSW.
108. Mrs. M. Guidera, Perth.

109. Mr. B. Carswell, Launceston, Tas.
 110. Mrs. L. Carswell, Launceston, Tas.
 111. Mrs. F. Mackintosh, Melbourne.
 112. Mrs. D. O'Brien, Melbourne
 113. Miss M. Judd, Melbourne
 114. Mr. C. Lanyon, Melbourne
 115. Miss L. Hooper, Melbourne.
 116. Mrs. M. L. Hobbs, Auckland, N.Z.
 117. Mr. C. Strochnetter Pyengana, Tas.
 118. Mrs. G. Reardon, Melbourne.
 119. Mrs. A. Spencer, Brisbane.
 120. Mr. Y. Waseda, Nagoya, Japan.
 121. Mr. W. C. Olsen, Masterton, N.Z.
 122. Mrs. E. F. Olsen, Masterton, N.Z.
 123. Mr. M. Leereveld, Belgrave, Vic.
 124. Mrs. A. Leereveld, Belgrave, Vic.
 125. Mrs. D. Howes, Yarram, Vic.
 126. Mr. V. Gueltling, Sydney
 127. Mrs. M. Gueltling, Hamburg, Germanujo.
 128. Mrs. U. Talbot, Ferny Hills, Q'ld.
 129. Mrs. M. Wvbenga, Morwell, Vic.
 130. Mr. E. E. Thompson, Melbourne.
 131. Mr. E. McKenzie, Warrandyte, Vic.
 132. Mrs. M. McKenzie, Warrandyte, Vic.
 133. Mrs. Gerta Ross, Richmond, Cal., USA.
 134. Mrs. N. Claxton, Perth.
- State Distribution: Vic. 44; N.S.W. 23; Q'ld. 21; New Zealand 12; Tas. 10; W.A. 9; U.S.A. 6; S.A. 3; Japan 2; A.C.T. 1; Austria 1; Eire 1; Germany 1.
- Mrs. L. Greig (Masterton, N.Z.), being Congress Member No. 100, will receive a small book prize at the Welcome Evening of the Congress.

SCOUTS/ GUIDES. New Australian representative:

Hans Brendel
3/119 Kadumba Street,
YERONGA, QLD. 4104

has just taken over the job of Australian representative of the Scout Esperanto League (which includes Guides) from Stan Milligan Anyone wishing to help along the work of the League in introducing Esperanto into Scouting and Guiding, send \$1 to Hans as membership fee. And tell your local Scouters and Guiders about the League. Free brochures available (say how many you can use) from John Moore, Pelican Street, Emu Park, Qld. 4703. Scout Esperanto textbooks also available. Just ask.

WORLD JAMBOREE. Arrangements are in full swing and the Scout Esp. League will be well represented in Norway at the Jamboree. The League's President is on the official staff, and an "Esperanto information tent" will be in the camp, with full rights to the League to publish items in the official camp journal. Esperanto-speaking Scouts hope to meet in the course of the Jamboree.

NIA HISTORIO

Legantoj, bonvolu noti, ke en la pasinta (Majo-)numero, super la bildo pri John Booth (p.167), mankas rubriko preterlasita de nia presisto. Tiu devis teksti jene:

**"No. 4. JOHN BOOTH, 1857-1920.
LA PATRO de la AŬSTRALIA
ESPERANTO-MOVADO."**

**No. 5. F-ino "TILLY" ASTON,
1873-1947.**

En "La Rondo", Vol. 7, N-ro 9, Decembro, 1947, sub la rubriko, "Tilly Aston Forpasis" (p. 70), aperis la jena nekrologo:

"F-ino Matilda Ann Aston, mond-konata blindulo-Esperantisto, mortis 1/10/47 aĝe 74 jarojn. Perdis la vidpovon en frua infaneco, ŝi tamen ricevis edukon kaj servis kiel ŝtatinstruisto ĉe la Blindula Instituto en Melbourne. Ŝi estis kunfondinto en 1895 de la Asocio de Porblindula Progresigo, kaj estis ĝia prezidanto en la tempo de sia morto.

"F-ino Aston fondis la rondon de blindulaj korespondantoj, kiu pionire antaŭiris la grandan Bibliotekon Brajlan. Ŝi estis sukcesa verkisto, kion atestas kelkaj volumoj da prozo kaj poemoj. Fervore kaj regule ŝi interŝanĝis leterojn brajlajn kun senviduloj Esperantaj tra la mondo.

"La tombo estas en St. Kilda, Melbourne."

Estis bona, longa artikolo pri ŝi en la "Edukada Gazeto", Vol. 28, N-ro 2, Marto, 1971, publikigita de la Edukada Departamento de Viktorio. Tiu artikolo komenciĝis per la frazo — "Tilly Aston, la unua blinda instruisto en nia Edukada Departamento, estis ankaŭ poeto, verkisto kaj filantropisto."

Matilda (do "Tilly") Ann Aston naskiĝis en Carisbrook, apud Maryborough, Viktorio, en decembro, 1873, kun difektita vidpovo. Kiam ŝi atingis sian sepan naskiĝtagon, ŝi estis tute blinda. Ŝi lernis brajlon, kaj eniris en junio, 1882, kiam ŝi estis ok-kaj-duon-jara, en la Lernejon por la Blinduloj en

Melbourne, por daŭrigi sian studadon. Ŝi gajnis la rajton enregistri sin kiel studenton en la Universitato de Melbourne, kaj sukcesis en la ekzamenoj de la unua jaro de la Fakultato de Artoj — sed, pro malsaneco, ŝi ne povis fini la kurson, kaj devis forlasi pluan studadon.

Ŝi aliĝis al la Melburna Esperanta Klubo en 1907, kaj uzis Esperanton por antaŭenigi sian laboron por la blinduloj de la mondo. En 1912, ŝi elektiĝis Direktoro de la Lernejo por la Blinduloj, kaj tenis tiun postenon ĝis 1924, kiam ŝi devis eksiĝi pro malsaneco.

Ŝi prenis gravan rolon en niaj unuaj du kongresoj, 1911 kaj 1912. En Adelaide, dum la Solena Malfermo de la Kongreso, ŝi prelegis al la grava Ĉeestantaro pri "Kion Esperanto Signifas al la Blinduloj". Ŝi prelegis duafoje dum la Prezidanta Akcepto, unu vesperon de la Kongreso, kaj ankaŭ solkantis — ĉar ŝi havis muzikan kaj dolcan voĉon. Ŝi plenumis similan rolon en la Dua Kongreso en Melbourne, oktobron 1912.

Jen ŝia traduko Esperanten de "Humility", eta poemo de la angla poeto, Robert Herrick, 1591-1674:—

Humileco.

Mi timas peti kison,
Rideton eĉ de vi,
Ĉar se mi ilin havus,
Fiera iĝus mi!

Ne, jen la sola ĝojo
Por mi, ho amaĉin',
Nur kisi la aeron,
Jus kiu kisis vin.

—I. T. Maddern

AŬSTRALIA = = KRONIKO

• **PERTH:** Okazas nuntempe kelkaj klasoj en nia urbo. F-ino O. Stempel instruas plenaĝulojn ĉe Dianella dumtage; S-ro David Miller gvidas klason por infanoj ĉe Roleystone; F-ino Olive Hunt instruas klason jaŭdvespere. Ŝi ankaŭ gvidas klason ĉe Morley Elementa Lernejo dumtage. S-ino Wapnah instruas infanojn ĉe North Beach Elementa Lernejo. Fratino Helen, mem nur novulo, instruas klason posttagmeze ĉe la Brigidine Lernejo en Floreat Park. La Junulara Rondo kunvenas je la tria sabato ĉiumonate, sub la sperta gvidado de Olive Hunt.

La inaŭgura kunveno ĉe la Universi-

tato Murdoch okazis je 20-a de majo. 16 membroj ĉeestis. S-ino Ruth McGrath streĉe laboradas por sukcesigi la kurson.

Dimanĉon, 13-an de aprilo, membroj kaj amikoj vizitis la belan hejmon de S-ro David Miller ĉe Roleystone por pikniki. Post la manĝo ĉiuj formis rondon kaj ludis "Pasigu la Paketon" sub gvidado de S-ino Einihovici. S-ro David Miller bele pianludis kaj Ges-roj Larter kantis.

• **MELBOURNE:** Okaze de la monata amuzvespero S-ro Len McLochlan montris kolorplenajn, unikajn diapozitivajn kaj parolis pri Bali. (28/4). S-ro Ken Linton (5/5) prezentis siajn tradukojn de "La Tago kiam la Magio Mortis" (temo pri la forto de la junaĝa imago-povo) kaj de du amuzaj rakontoj pri la generacia malakordo.

Interesan vesperon provizis S-ro Marcel Leereveld (12/5) kiam li rakontis pri vizitoj al Hong Kong, Macao kaj Tel Aviv kaj montris nekutimajn bildojn. S-ro H. Beechey (19/5) prezentis ankoraŭ unu el la serio "Kiel travivi perdiĝon en la veprejo sen helpiloj de la civilizacio" — "La arto konstrui ŝirmejon." Ĉe la maja amuzvespero S-ro Ken Linton daŭrigis mont-radon de lumbildoj kun komentario pri Nov-Zelando (26/5).

• **MORWELL:** Nia jarkunveno okazis la 3-an de junio en la hejmo de Ada kaj Henk Schepers en Won Wron. Elektiĝis la jena estraro: Prez: S-ro H. Schepers; Vic-Prez. S-ro W. Wybenga; Sekr./Kasisto: S-ino M. Wybenga; Protokol-Sekr: S-ino Ada Schepers; Komitatanoj: S-ro kaj S-ino E. Mad-dern. —H.S.

• **LAUNCESTON,** Tas: Ni ricevis interesan raporton pri tiu nova Esperanto-Klubo, verkitan de la Prezidanto S-ro Mac Le Fevre, kiu estas membro de la Tasmania Parlamento. Laŭ la raporto la Launceston klubo komencis sian agadon malfrue en 1973 per kurso de S-ro Jack Gibson ĉe la Plenaĝula Edukada Centro. Estis komence 20 lernantoj, sed nur 8 restis aktivaj dum 1973. Kelkaj membroj aliĝis al A.E.A. kaj S-ro Mac Le Fevre elektiĝis Prezidanto. Lia filino, S-ino Lynn Carswell, estas la sekretariino kaj ties edzo Brian estas la Kasisto. S-ino Kay McFarlane estas la bibliotekistino. Nuntempe klasoj okazas ĉiulunde ĉe Paterson Street Matriculation College, kie S-ro Jack Gibson estras la lingvan departementon.

Nova klaso komenciĝis en februaro ĉijare kun 20 studentoj. Samtempe okazis tre sukcesa ekspozicio de bild-poŝtkartoj kaj leteroj, ricevitaj post

anonco en "ESPERANTO" (de UEA). Por novembro la klubo planas "kongreseton" en Launceston, prepare al la Melburna kongreso.

Pruvo pri la bona agado de la nova klubo estas la fakto ke jam 10 membroj aliĝis al la Pacifika Kongreso.

• **SIDNEJO:** Speciala kunveno okazis (1/5) en Esperanto-Domo honore al S-ro Eino Looirts el Hobarto, Filatelio Fakdelegito de UEA, kiu alvenis per la ŝipo "Galileo Galilei" survoje al la 60a kongreso en Kopenhago.

Parolanto Tom Elliott (19/5) revuis librojn de diversaj aŭtoroj, inkluzive de Raymond Schwartz. Antaŭ ol disiĝi, ĉeestantoj interŝanĝis leterojn por la sekvonta kunveno.

Lundon (26/5), ĉiu voĉlegis sian respondon al nekonata skribinto. Tre diversaj estis la temoj, kaj ofte amuzaj la respondoj. Samvespere, S-ro Volo Gueltling raportis, ke, en la semajno ĵus pasinta, Fritz Mueller-Soraŭ suferis koratakon.

La temo de programo (2/6) kiun prezentis Robbie Robertson, estis "Vojaĝo al la Luno, per lumbildoj, kun profesoro". La "profesoro" estis Aldrin, kiu estis en la unua "ŝipo" al la Luno kaj poste iĝis profesoro. Fotografajoj pri la Luno, la mondo kaj la "ŝipo", kune kun diagramoj, kontribuis al interesega parolado. En la kadro de tiu programo, la anoj diris "Ĝis revido'n al nia Prezidantino, Shirley Fanos, kiu veturos al Eŭropo.

Denove ni diris "Ĝis revido'n (9/6), ĉi-foje al Wre Chandler, kiu baldaŭ ekiros al Kopenhago. Li parolis pri la peza laboro de ORE-prezidanto, precipe rilate al kompilo de vortaro pri bird-nomoj por la pli ol 700 specoj nialandaj. —Margaret Chaldecott.

• **MANLY:** Ĉe Trimestfina vespero en "Manly Evening College" (29/4), anoj bonvenigis el Melburno F-inon Ann Hearn, kiu poste parolis pri sia flank-okupo. Ĉeestantoj ĝuis varian programon de ludoj, kantoj, anekdotoj kaj skeĉoj. Aparte amuza estis la aktorado pri la geedza vivo fare de Ges-roj M. Ross, al kies hejmo ĉiuj poste iris por refreŝiga manĝeto.

"Manly"-anoj ankaŭ troviĝis inter partoprenantoj de festprogramo en Esperanto-Domo de Sidneja Esperanto-Societo (1/5) por saluti Ges-rojn Looirts el Hobarto survoje al Kopenhago.

"Manly Dam", dimanĉon (4/g), estis la kunveno por la monata pikniko, kiun ĉeestis esperantistoj el la ĉirkaŭaĵo de Manly-Warrangah kaj Sidnejo. Tiun tagon konkludis manĝo kaj sociata

vespero en la hejmo de S-ino R. Caruthers ĉe Balgowlah.

• **BRISBANE:** La 17-an de aprilo okazis Esperanto-Vespero ĉe la Brisbane Education Centre. E-Literaturo kaj instrumaterialo estis ekspoziciitaj kaj restis en la Centro dum 6 semajnoj. Pli ol 1000 vizitantoj vidis la ekspozicion.

Sekvante la ekzemplon de S-ro I. T. Maddern, membroj komencis la kompiladon de la historio de la Brisbana E-Societo ekde la fondiĝo en 1906. Stud-semajnfino ĉe Mt. Glorious okazos 21-22-an de junio.

La "Sen Lima Grupo" kunvenas ĉiumerkrede en la hejmo de Ges-roj Greenhalgh. Kelkaj membroj kunlaboras kun la Brisbana Kantgrupo.

• **SOUTHPORT:** Ges-roj S. Kunze (Redcliffe), S-ino Doak kaj Elsie Taylor kunvenas de tempo al tempo kun novaj lernantoj de la ormarborda Grupo.

• **SUNBRILA MARBORDO:** La Radio-Programo "Bonan Tagon" de Radio-Stacio 4 NA fariĝis granda sukceso. Okazas du kvinminutaj elsendoj semajne. Partoprenis 12 lernejoj en la unua dissendo. Kvindek plenaĝuloj petis lecionojn por la 2-a dissendo.

• **ROCKHAMPTON:** Okazas tri kunvenoj ĉiusemajne. Mardmatene kunvenas studgrupo de kvin iamaj lernantoj de Desley Davies. Jaŭdespere okazas kurso gvidata de Joyce Turner kaj sabate kunvenas konversacia rondo. Partoprenas 8 membroj, kiuj devas paŝi punon de unu cendo por ĉiu frazo ne en Esperanto.

• **KAPRIKORNA MARBORDO:** La nova klubo fondiĝis (18/3) kun 11 membroj. Sek/Kasistino: Patricia Murphy, Caravan Park, Bell Park, EMU PARK 4703. Vizitis nin (18/6) Ges-roj Woodruff de Moree, NSK (antaŭe de Anglujo kaj Sudafriko). Ted parolis al ni pri siaj spertoj en 7 Universalaj Kongresoj, kaj kiel Ĉefdelegito, en Sunafriko, kaj pri eminentuloj, kiujn li konis bone en Anglujo — inter kiuj S-ro Kearney, aŭtoro de "Esperanto in Outline". (kion ni baldaŭ uzos en nia kurso).

Klubanoj Hermann kaj Julie Hock nun estas en Munkeno, vizitante parencojn (kiuj ankaŭ estas Esperantistoj!) Sed klubanoj Andrew, Matthew, Erwin kaj Sep Hock loĝas en loĝlernejoj kaj ne povas ĉeesti la klubon ĝis la reveno de la gepatroj. Ho ve! Sed ni ankoraŭ esperas gastiĝi la Majan konferencon de la Kvinlanda Federacio en 1976, en nia bela marborda urbeto, EMU PARK.

Erareto en lastmonata "A.E.": La nova Sekretario de la Rockhamptona E-Societo, S-ro Gil Shonhan, estas

Fraŭlo, ne fraŭlino. Gil petas la pardonon de ĉiuj, kiuj skribis al "ŝi" petante edziniĝon. — John Moore.

EL LA FEDERACIOJ:

• **Kvinslando:** Dudek sep membroj de la Federacio partoprenis agrablan semajnfino ĉe Scarness, Hervey Bay, de la 3-a ĝis 5-a de Majo. La Prezidantino (S-ino D. Sinclair) anoncis, ke la Federacio nun konsistas el 6 kluboj, post la aliĝo de la nove fondita Kaprikorna Marborda Klubo. La Kasistino (S-ino Joy Kunze) raportis, ke la federacia bilanco estas nun \$206.39.

Okazis konferenca vespermanĝo, kaj, laŭ flustro, multe da vino liberigis la langojn por flua konversacio.

La venonta konferenco okazos 11-12 oktobro ĉe la Metodista Junulara Centro en Margate. La Jarkunveno okazos 1-an de februaro 1976 ĉe la Brisbana Eduka Centro. Provizore Rockhampton invitis la konferencon por majo 1976 al Emu Park.

• **Viktorio:** La Jarmezaj kunveno de la Federacio okazis je 31-a de majo en la sidejo de la Societo de Amikoj (Kvakeroj) en Toorak. Por tiu "Kaserol-Vespero" respondecis la tri Melburnaj E-Grupoj. Anoj de la Oakleigh Klubo provizis antaŭmanĝaĵojn kun trinkaĵoj. Malvernanoj prizorgis la kaserolajojn, dum anoj de la Melburna E-Societo servis kukojn kaj aliajn bakajojn, kiuj akompanis kafon. 41 membroj kaj amikoj partoprenis. Komuna kantado kaj tre varia programo de diapozitivaj pri multaj mondpartoj kompletigis sukcesplenan kunvenon.

La Federacio planas semajnfinan seminarion dum novembro en la Dandenong-Montaro.

N.S.K.: Ni bedaŭrinde ne ricevis raporton de tiu Federacio.

Gertrude Pollard 1890-1975

La 25-an de aprilo mortis en Perto la multjara Esperantistino Gertrude Pollard, 85 jara, post proks. dumonata malsaneco en "Corlei Nursing Home".

Ŝi naskiĝis en Suda Aŭstralio kaj poste translokiĝis kun sia terkultivista patro kaj familio al Katanning, Okcidenta Aŭstralio. Ŝi fariĝis instruistino, kiun profesion ŝi forlasis por edziniĝi, sed ŝi revenis al ĝi en proks. 1947 kaj emeritiĝis en 1955.

D-ro Caldera varbis ŝin al Esperanto iam antaŭ 1945. Ŝi gvidis sennombrajn E-kursojn, plenumis plurajn rolojn en la komitato kaj tre kompetente servis kiel Prezidanto en la jaroj 1957/58. Ŝi aktivis en la E-Asocio por Instruistoj, unue kiel sekretario kaj poste kiel

prezidanto. Ŝi partoprenis Universalan E-Kongreson en Helsinko en 1969.

Ŝi laboris en multaj rondoj neesperantistaj, sed ŝi neniam ĉesis propagandi Esperanton. Jam 82-jaraĝa ŝi vojaĝis preskaŭ 2,000 mejlojn por partopreni la Melburnan Kongreson en 1972.

Gramatike-

La prepozicio "ĉe" montras tuŝan apudecon, faktan aŭ metaforan, lokan aŭ tempan. Jen estas ekzemploj:

1. Ili sidis ĉe la tablo.
2. Li kuŝis ĉe ŝia flanko.
3. Ŝi venis loĝi ĉe ni.
4. Ĉe bonaj aŭtoroj oni ne trovas tiun formon.
5. Li estas profesoro ĉe la universitato.
6. Kiu parolos ĉe la klubo?
7. Ŝi staris ĉe la pordo.
8. Ĉe la alia flanko de la strato.

Jen kelkaj utilaj Zamenhofaj esprimoj: estebleco, Likelihood; anara sento, herd instinct; sana prudento, common sense; frazista sensencaĵo, verbiage; konfuzita fadenbulo, tangled skein; pufvanga, chubby; bonhava, well-to-do; jetkovrita per, strewn with; kontraŭflue, upstream; afertuŝante, relating to; konkure kun, vying with; laŭtakte de, in time with; forrifuzi, renounce; surprovi, try on (veston); frotpurigi, scour; repreni sian promeson, to break one's promise; esti preĝejanoncita, have one's banns read.

En "Literatura Mondo" de Aprilo, 1931, (la monato antaŭ ol mi fariĝis Esperantisto) mi trovis la jenan juvelon: Ĝi estis verkita de J. Lejzerowicz.

Se efektive Esperanto iam pli poste kondukos la homaron al nova kulturo, tiam verŝajne ankaŭ por ĝia originala literaturo malfermiĝos nova horizonto. Tiam eble formiĝos ia reala supernacia kompakta socio, kiu stampos sian markon ankaŭ sur la vivon de individuoj. Estas malfacile imagi la precizan formon de tia socio, sed estas verŝajna principo. Tiam nia literaturo havos la taskon disvastiĝi novan realan kulturon — kaj en tjo plenumiĝos ĝia misio. Sed ĝis tiu feliĉa momento ni dume devas vivi nian nunan vivon kaj respeguladi en nia literaturo ĝuste tiun ĉi nunan vivon. Se ni mem ne kapablas per originalaj verkoj fari tion, venas kun helpo la tradukita literaturo, en kiu oni povas abunde kribri: ĝi kapablas liveri al ni — se ni nur volas — verajn perlojn, kiujn la kritikistoj de la tuta mondo aklande aprezis kiel la plej bonajn.

—Ken G. Linton.

NEWS - DIGEST

HERE'S GOOD NEWS! At last, some legislature has come up with an original way of honouring the founder of Esperanto. And it's one that can only win credits for our cause from the man-in-the-street. There are "Esperanto Parks" and there are "Zamenhof Streets" (see Tours Report below), but while these are often hard-won, it took a Deputy of the parliament of the Brazilian State of Sao Paulo to think up something new.

Prof. Solon Borges des Reis was the instigator of an Act passed by the Sao Paulo State Government in November. His legislation has had December 15th set aside every year AS A PUBLIC HOLIDAY to honour the birth of Dr. Z.

Professor, *News Digest* dips its collective lid to you.

NEW ZAMENHOF STREET: There were 183 French Esperantists and twelve cross-border visitors on hand last March in Tours, France to see Deputy Town Mayor, M. Dubreuil and Esperanto Academy President, Prof. Gaston Waringhien unveil a plaque proclaiming the "Rue du Docteur Zamenhof, Inventeur de l'Espéranto 1859-1917". It was during this year's French Esperanto Congress.

FINNISH COURSE BEGINS: Jorma Ahomaki is leading the very first Esperanto course at the Finnish University of Turku.

FLOWERS FOR DR. Z: Wreaths and garlands were laid at the foot of the Zamenhof statue in downtown Vienna on April 12th. It was the traditional Zamenhof Memorial Day arranged under the joint auspices of the Polish Institute in Vienna and the Austrian Esperanto Federation. Other international organisations later joined them at the Institute for a cultural evening. Speakers included Magister Jerzy Passendorfer and Walter Mudrak. Also Dr. Karl Beckman spoke about Dr. Zamenhof's student days in Vienna.

NEW TITLE: International Esperanto Museum Director Dr. Walter Hube was

recently promoted by the Austrian Government to "Oberstaatsbibliothekar" ("Senior State Librarian").

THIRTY SOVIET SOCIETIES: A recent report from the USSR advises that 30 Esperanto societies have joined the Soviet Esperantists Youth Movement (SEJM). Another 15 societies are in the queue for affiliation. Accreditation will be given if they can work contentedly for one year.

CANARIES: The press of Las Palmas recently carried reports of an Esperanto exhibition display there.

SLOVAK ANTHOLOGY: The best of the slovakian writing—classical, romantic and realistic—has been culled and translated into Esperanto for the Slova Antologio. Scheduled to appear in 1976, it will have more than 400 pages and 25 plates showing the authors. The publishers are Pedagogical Publications of Bratislava.

SCOTS UNITING: Next year's Scottish Esperanto Congress will be held in Dundee.

NEW COURSE: At the School of Economics in Split, Yugoslavia an Esperanto Club has recently been formed. Membership is drawn from all academic levels from professor down to student. Also in Split the elementary school teaches the international language as do the two commercial learning centres there. The new club wants Esperanto to be the number one number two language at the School.

VETERAN: The oldest living member of the venerable Veteran Esperantists is Haralambi Ivanov Bačvarov. He was born in Bulgaria in 1882 and put on his star in 1906.

CHIHUAHUANS CHAT ON CHANNELS: Mrs. E. Magana de Baca led members of the Chihuahua, Mexico, Esperanto Club onto a local TV show in February. Later, in April, Esperanto got another boost when the national channels carried an interview with Dr. P. Magana Erosa and the engineer A. Luna Cardenas. They told of the history of Esperanto in Mexico over the past eighty years. About two million viewers are believed to have been tuned.

CZECHS CHECK CHEQUES: In only five years, the Czechoslovakian Esperanto Association has amassed 2,500 paid up members.

OVER TO YOU SIR! It was German Esperantist August Wetterstein who got the Bundestag (German Federal Parliament) to consider the official introduction of the international language into the Republic. Consider it they did at the 143rd. sitting on January 23rd.

Herr Wetterstein received the following courteous reply. Esperanto, they told him, has been given an official status by having it named as one of the responsibilities of the Ministry for Science and Education. Steps had already been taken to ensure that the Minister was kept informed on Esperanto activities.

Regarding Esperanto in the press and on Radio, the Parliament continued saying that freedom of the media from governmental interference was guaranteed by the German Constitution. "If you want Esperanto in the media", it said in effect, "then it is up to each individual federal citizen, either solely or in concert, to utilise the existing possibilities to influence the newspapers, radio and television".

TEACHERS LEARN: Student teachers in Hungary at the Teachers' Colleges of Sombathejo, Estergom, and Saropatak are learning Esperanto. Their courses take either three or five hours per week and will last for three years.

GREEN STAR RATING: Maybe it doesn't rate a mention in the *Guide Michelin*, but the Verda Café in England's Stoke-on-Trent was recently shown on British TV. An Esperanto Club meets there.

TONKIN PAYS HIS WAY: In Paris, France for UNESCO, Dr. Humphrey Tonkin took time out to look at Esperanto affairs, but the UEA President refused to accept help with his travelling expenses from the world body.

TRILINGUALITY: This July, the Organisation Ecole Instrument de Paix meets in Quebec, Canada. Can you guess the three official languages? Bravo.

CREDITS: News Digest acknowledges—PP. HdE nd IEMW.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



Redakcio: "Esperanto", Box 2122 T., G.P.O., Melbourne, 3001, Aŭstralio

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.
A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Rd., Lindfield, N.S.W. 2070
Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W. 2095.
A.E.A. Libro-Servo: T Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036.

N-ro 141 (221)

MELBOURNE

Sept./Okt., 1975

KIEL PREZIDANTO

Mi ricevis multajn leterojn dum du jaroj, de multaj samideanoj, kaj mi skribis multajn respondojn. Al kelkaj korespondintoj, ne la malpli gravaj, mi ne respondis, ĉar ili demandis pri aferoj ne facile decideblaj, ekzemple:

La propono de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio, inviti eminentulon al la Pacifika Kongreso de Esperanto, la venontan januaron. Laŭ la sugesto de S-ro Howard, ni "kontrolis, ĉu la ideon aprobas la diversaj kluboj." Mi skribis al ĉiuj kluboj kaj Federacioj en Aŭstralio; kelkaj tuj respondis "NE", multaj post la unua aferkunveno respondis "NE", kaj kelkaj neniam respondis. Tiuj lastaj ne plu estas aktivaj, ĉar bedaŭrinde kelkaj aktivuloj forpasis. **Neniu grupo jesis.**

La propono de S-ro R. Harry, publikigi la "Lingvajn Notojn" de S-ro F. R. Banham, kaj aliajn eldonaĵojn. Mi elkore subtenas la entreprenon, sed mankas inter ni verkisto sufiĉe lerta, kiu disponas pri sufiĉe da tempo por plenumi la gravan taskon. Mi enketis inter fervoruloj kaj aktivuloj, sed ĉiuj estas ege okupataj pri la aferoj kaj eldonaĵoj de la movado en Aŭstralio. Ĝis nun, mi ne sukcesis eltrovi redaktoron por la "Fonduso F. R. B."

La propono de S-ro N. Gamble pri monumento sur Monto Ainslie, por memorigi la arkitekton W. Burley Griffin.

Laŭ mia privata opinio, la proponita monumento estus granda malŝparo de

mono, ĉar la tuta ĉefurbo jam memorigas ĉiujn pri Griffin, kaj la bela lago jam portas lian nomon. Tamen, se la estraro intencas elspezi la monon, ni rajtas utiligi la okazon por propagandi nian lingvon, se eble.

Mi ne konsentas, ke ni rajtas skribi la vortojn "Unu Dio" sur la ŝtonon ĉar Esperanto estas neŭtrala, kaj inter ni estas Budhanoj, Sintoanoj, Hinduoj, Ateistoj kaj humanistoj; komunistoj el Rusujo kaj komunistoj el Ĉinujo. Kiu supozas, ke ĉiuj Esperantistoj kredas je unu Dio, malpravas. Pri "Unu Mondo, "Unu Helplingvo", oni rajtas esperi.

Esperantigitaj Filmoj: Kelkaj samideanoj enketis pri Esperantigitaj filmoj. Mi kontaktis S-ron A. Anderson, reĝisoro kiu respondecas pri ne-anglalingvaj filmoj ĉe "Film Australia" kaj li certigis min, ke li metos la filmon "Kvina Fasado" en mian manon antaŭ ol mi forveturos por ĉeesti la Kongreson en Melburno. Entute kvin filmoj ekzistas kun Esperanto-komentario. "Double Trouble" pri enmigrintoj kaj lingvaj malfacilaĵoj, "Land of Everchange" (komentario de S-ro Schwerin), "This Land Australia", "Tempo — Australia in the 70's (komentario de S-ro Dunn), "La Kvina Fasado" (pri la Operdomo, komentario de S-ro Gueltling).

S-ro Anderson pretigas liston kaj volonte pruntedonos la filmojn al seriozaj grupoj kiuj disponas pri taŭgaj projekciiloj kaj lertaj projekciistoj.

Post-kongresa renkontiĝo en Sidnejo: Aliĝis al la post-kongreseto el Nov-Zelando 4, Tasmanio 3, Kvinslando 1, Kalifornio 1, Aŭstrio 1, Belgio 1, entute 11. La komitateto kunvenis kelkfoje por diskuti la programon, kaj decidis, ĉar la ĉeestontaro ne estas multnombra, ke formala kongreso ne estos taŭga, ĉar la samideanoj jam ĉeestos kunvenojn, prelegojn, bankedon k.t.p. en Melburno.

Ni intencas permesi al la vizitontoj ripozi en aŭstraliaj hejmoj, ĝui la vivmanieron de la Sidnejanoj, vojaĝi sur la bela haveno, kaj vagadi tra la stratoj de la plej malnova urbo de nia kontinento.

La 14-an de januaro, jaŭdon, ni renkontiĝos, kaj vizitos la nordan marbordon per aŭtomobiloj, aŭ se necese, per aŭtobuso. La 15-an, vendredon, ni vojaĝos sur la ferdeko de la luksa pramo "Captain Cook, sub ŝirmilo. La 16-an, sabaton, ni vizitos la antikvajn kvartalojn de la urbo; gvidos nin la Esperantistoj el Sidnejo. La Roka Kvartalo, Paddington kaj la Botanika Bajo estas sufiĉe interesaj vodindaĵoj.

Jaŭde la mondo laboros, do, la popolamasoj ne kuŝos sur la plaĝoj. Sabate, la urbanoj libertempos, kaj la centro de la urbo estos sufiĉe malplena. La vojaĝo estas jam aranĝita.

Se la nombro de la ĉeestontoj ne multe kreskos, estos eble ke la partoprenantoj loĝos ĉe gastamaj Manlianoj kaj Sidnejanoj. Alie, ni aranĝos loĝadon ĉe motelo aŭ hotelo.

Pri la Estraro: Mi tre bedaŭras, ke kaj la Sekretario kaj la Kasisto intencas rezigni. Ili ambaŭ bonege laboris dum sufiĉe longa periodo, kaj plene meritis iom da ripozo. Laŭ mia opinio, neniu rajtas deĵori kiel estrarano en demokrata organizaĵo dum multaj jaroj. Jen la diktatoroj Franco, Mao, Chiang, Tito k.t.p. kiuj regas multajn jarojn. Jen la demokratiaj, elektantaj novajn estraranojn multfoje dum la sama periodo.

Espereble ni trovos novan Kasiston kaj novan Sekretarion tiel kapablaj kaj laboremaj kiel la eksigantaj. Se iu kandidatiĝus min, kaj la plimulto elektus min, mi estus preta deĵori denove kiel Prezidanto. Se ne, mi volonte eksigigos, gratulos la freŝe elektitan Prezidanton kaj lojale subtenos lin.

—R. G. Robertson, Prezidanto.

Paĉjo, kio estas sperto?

Sperto, mia filo, estas tio, kio restas post la perdo de ĉio.

NI LEGIS EN "REVUO ORIENTA"

Dank' al la afabla kunlaboro de S-ino Yukiko ISOBE, direktorino de la internacia sekcio de "Japana Esperanto-Instituto", aperis en la junia numero de "Revuo Orienta", kune kun 2 fotografajoj pri la Kolegio "Queen's", du artikoloj pri la "Pacifika Kongreso". Unu artikolo temis pri la kongreso ĝenerale kaj kiamaniere aliĝi al ĝi. La dua artikolo, kiun ni sube represas temas pri la historio, kiu kondukis al la fina aranĝo de la kongreso:

La Unua Pacifika Kongreso

Je ĝia okazo en Aŭstralio

En la somero 1967-a, ĉe la 54-a Japana E-Kongreso en Kyoto, la "Esperanto-Disvastiga Societo" proponis ke la Pacifika Kongreso okazu en Japanujo en 1970. Tiu ĉi propono ne povis esti akceptita je tiu tempo kaj speciala komitato estis formita por ekzameni la ideon.

La komitato konkludis, ke la okazigo de tia kongreso en la 1970-a jaro ne estas necese taŭga dank' al la kondiĉoj kaj ke la diversaj Esperanto-organizaĵoj en la Pacifika Regiono estu petataj esprimi siajn ideojn.

En la sama jaro preskaŭ samtempe diskuto pri similaj planoj okazis en la Pacifik-Regionaj Konferencoj kaj tutlanda kongreso de ELNA en Usono kaj multaj partoprenantoj aprobis la planon kiel ĝeneralan principon.

En 1972, ĉe la 59-a Japana Kongreso en Takamacu, la "Zamenhofa Grupo" proponis, ke la Pacifika Kongreso estu okazigita, sed ne estis sufiĉa harmonio inter la diversaj ideoj pri la plano kaj estis necese prokrasti finan decidon.

Ĉe la 57-a Mondkongreso en Portland, kunsido okazis pri la ebleco de okazigo de Pacifika Kongreso kiel unu el la fakkunsidoj. Ĉeestis la kunsidon pli ol 30 personoj, kiuj venis de Japanujo, Usono, Kanado, Nov-Zelando, Italujo kaj Svedujo. Ili parolis pri la neceso ekzameni la planon en siaj diversaj landoj kaj interkontakti unu la alian pri la loko kaj la tempo por tia kongreso en proksima estonteco.

En Japanujo post tiu tempo, kiel antaŭe, diversaj opinioj estis esprimataj: (1-e) Nura interamikiĝa kongreso ne havas signifon, (2-e) Oni bezonus lokon, kie Esperantistoj de aziaj landoj povos partopreni kongreson sen antaŭjuĝo, (3-e) Por la progreso de la movado tia kongreso estu tia, kia ampleksos seriozan enhavon, (4-e) Por tia kongreso la tempo ankoraŭ ne alvenis.

Ĉar okazis tiaj diversaj ideoj, estis malfacile unuigi la opiniojn de la diskutantoj. Estis dum ĉi tiu tempo, ke Aŭstralio deklaris, ke ĝi deziras okazigi la 1-an Pacifikan Kongreson preferante **agon antaŭ argumento.**

La detaloj de la venonta kongreso ankoraŭ ne estas klaraj. Tamen, ŝajnas al ni ke la 1-a kongreso okazos kun interamikiĝo kiel ĉefa motivo kaj estos organizita en maniero simila al tiu de Monda Kongreso.

Dum longa tempo la monda Esperanto-movado estis centrigita en Eŭropo kaj la solaj internaciaj kunsidoj en la Pacifika Regiono estis la 11-a Mondkongreso en San Francisko 1915, la 50-a Mondkongreso en Tokio 1965 kaj la 57-a Mondkongreso en Portland 1972. Aŭstralio estas la unua lando, kiu nun antaŭiras aligi landojn en la nova kampo de internacia kunlaboro, kiam ĝi preparas la Pacifikan Kongreson. Estas dezirate, ke la landoj ĉirkaŭ la Pacifika Oceano kunlaboru pozitive por la plano.

Pri la okazigo de Pacifika Kongreso okazos diversaj problemoj, se ni konsideras la ĝisnunajn argumentojn en Japanujo; sed ni ne postulu, ke la kongreso estu perfekta en sia unua formo. Ni ekspektas ĝian sukceson ĝuste ĉar ĝi estas ankoraŭ nekonata.

(Libere tradukita el la japana lingvo de S-ano Jim OKI, Melbourne).



These two congresses will be held at Queen's College of Melbourne University. The 20th Australian Esperanto Congress will take place from the 2nd to the 4th of January, 1976 and the First Pacific Esperanto Congress from the 4th to the 10th of January, 1976.

Congress Fees: \$11; Pensioners, Students, \$6. Send your room reservation (\$10 Deposit) and Congress Fee to "ESPERANTO CONGRESS", Box 2122T., G.P.O. Melbourne, 3001 and enclose a stamped, addressed envelope for your receipt.

Eighth List of Congress Members:

164. Mr. R. Dearnley, Wellington, N.Z.
 165. Mrs. Joyce Torr, Southport, Q'ld.
 166. Mr. T. Ilow, Nhulunbuy, Northern Territory.
 167. Mrs. D. Young, Balgowlah, NSW.
 168. Miss G. Morgan, Toowoomba, Q'ld.
 169. Miss B. Williams, Melbourne.
 170. Miss M. Maddern, Melbourne.
 171. Dr. K. L. G. Smith, Balgowlah, N.S.W.
 172. Mrs. B. Frame, Sydney.
 173. Mr. R. Boyce, Melbourne.
 174. Mr. R. Taylor, Rabaul, New Guinea.
 175. S-ino Paz A. Macasaet, Manila, Philippines.
 176. Mr. V. MacGill, Christchurch, N.Z.
 177. Mrs. B. Podmore, Melbourne.
 178. Mr. L. Bankston, Adelaide.
 179. Mr. T. Pisz, Melbourne.
 180. Mrs. E. Ernst, Bruxelles, Belgium.
 181. Mrs. S. Blockley, Perth.
 182. Mr G. Shonhan, Rockhampton, Q'ld.
 183. Mr. F. Halls, Melbourne.
 184. Miss E. Fischer, Brisbane.
 185. Mrs. E. Aldridge, Dunedin, N.Z.
 186. Mr. J. Harwood, Sydney.
- State Distribution: Vic. 63; Q'ld. 37; NSW. 27; New Zealand 19; Tas. 10; W.A. 10; U.S.A. 6, S.A. 4; Japan 2; Philippines 1; Northern Terr. 1; A.C.T. 1; New Guinea 1; Austria 1; Belgium 1; Eire 1; Germany 1;
- A special welcome to Mrs. Elfriede Ernst, Secretary of the Esperanto Society of Brussels (Belgium).

Gerald Browne 1891-1975

Gerald Browne naskiĝis en Anglujo 25-2-1891, kaj migris al Sudafriko en 1911. Li unue informiĝis pri Esperanto de sia frato, Giles Leigh Browne (vidu sub Biografioj en "Esperanta Antologio"), kiu estis entuziasma Esperantisto kaj amiko de Montague Butler.

Gerald edziĝis al Alfreda en 1919 kaj la paron benis 3 filoj, el kiuj kruela sorto — la dua Mondmilito — forrabis du.

Nelonge antaŭ ol migri al Aŭstralio kun la restanta filo kaj ties familio, Gerald kaj Alfreda aliĝis al Esperanto-grupo en Germeston, Transvaal. Post alveno en Aŭstralio ili loĝis laŭvice apud Sidnejo, Melbourne kaj denove Sidnejo, kaj ambaŭloke, kiel eble plej reĝule ili ĉeestis klubkunvenojn. Ili ankaŭ partoprenis kelkajn aŭstraliajn

kongresojn kaj fine Gerald surpris sur sin la taskon raporti por "Aŭstralia Kroniko" detalojn pri la agado de Sidneja E-Societo. Bedaŭrinde pro malsaneco lastatempe, li devis rezigni pri tiu laboro. Li ceestis dimanĉan Diservon kaj mortis pace dum la nokta dormado ĝis 14/7/1975.

Kiu lin konis, neniam forgesos lian bonkoran kaj amindan personecon, nek specialan humursenton, kiu de tempo al tempo traradiis liajn raportojn kaj konversacion. A.E.A. partoprenas en la perdo al Alfreda kaj la familio, kaj esprimas plej korajn kondolencojn.

—Fay Koppel.



JEN

JUDY

La Nov-Zelanda E-Asocio aranĝis konkurson por la Junularo, kies premio estis \$120 kontraŭ la kosto de partoprenado en la Pacifika Kongreso de Esperanto. "KAJ", la junulara sekcio de N.Z.E.A., aldonis \$20 kaj la Kongres-Komitato donacas du aŭtobusajn ekskursojn kaj repagos la kongreskotizon al la gajninto.

Kandidatoj devis (a) prezenti eseon en Esperanto kun libera temo kaj longeco de 500-1000 vortoj, kaj (b) prezentio eseon en la angla lingvo kun longeco de 1000-1500 vortoj pri la temo "Esperanto en Nov-Zelando kaj la Pacifiko 1975-1980.

Gajnis la konkurson F-ino Judy Campbell el Dunedin. Ŝi estas 18-jara studentino ĉe la Universitato de Otago. Judy naskiĝis en Mosgiel ekster Dunedin kaj loĝis dum 2 jaroj en Waipori, malaranda vilaĝeto en la montetoj apud la Taieri Plains, Poste la familio iris al Roxborough en la centro de Otago. En 1965 la familio translokiĝis al Dunedin.

Judy unue konatiĝis kun Esperanto kiam ŝia patrino portis hejmen libron pri Esperanto. Poste ŝi kaj ŝia amikino Linda Allan (kiu cetere ankaŭ venos al Melbourne), vidis standon de la Dunedin Esperanto-Klubo ĉe urba festo. Dunedin

estas nuntempe la sola centro en Nov-Zelando kie junulara E-Klubo regule kunvenas kaj ĝia prezidanto estas Judy Campbell.

En 1974 Judy gajnis la titolon "DUX" en la "Otago Girls High School". Nuntempe ŝi plene okupigas en la unua jaro de studado ĉe Otago-Universitato pri la historio de la Mezepoko, la franca lingvo kaj la jura sistemo.

Dume, Judy ĝojatendas ne nur la plezurojn de partopreno en la Pacifika Kongreso, sed ankaŭ la eblecon revidi fraton, kiu loĝas en Wallsend, N.S.K.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

• **PERTH:** Multaj membroj de nia Ligo estas nuntempe for de Perth. La Prezidanto, D-ro A. Einihovici kaj edzino estas ankoraŭ en Eŭropo. Ili partoprenis la Universalan Kongreson en Kopenhago kaj nuntempe ferias en Svislando. La sekretario, S-ro W. Howard, vagadas "domveturile" en la orientaj ŝtatoj kaj ĵus sendis longan leteron el Alice Springs. F-ino A. Kimberley ĉirkaŭvojaĝas la mondon kaj S-ro W. Illingworth ĵus faris ekskurson sur la Rejno.

• **MELBURNO:** Ĉe la amuzvespero de 28/7, S-ro Len McLochlan montris kolorbildojn pri kamparaj scenoj, modernaj urboj kaj pitoreskaj Sanktejoj de Javo. Montrante lumbildojn pri Bangkok, Maŭricio, Johannesburg, Vieno kaj Zuerich (4/8), S-ro Marcel Leereveld donis informplenan komenton pri tiuj lokoj, kiujn li vizitis kun edzino antaŭ kelkaj monatoj.

S-ino Fay Koppel, 11/8 preparolis la laboron rilate E-literaturon de ankoraŭ du virinoj — Marie Hankel, nia unua poetino, kaj Margaret Hagler, kies anglalingva doktoriĝa tezo plivastigos la valoron de "La Esperanto-Lingvo kiel Literatura Medio." S-ro Ken Linton, 25/8, daŭrigis sian serion da prelegoj pri Nov-Zelando, kiam, 25/8, li prezentis diapozitivojn kun komentario pri Christchurch kaj Queenstown.

Du prelegantoj distris nin je 1/9. S-ro Marshall Cohen rakontis pri vizito al Kvinslando kaj S-ro H. Koppel raportis pri novaĵoj en Esperantujo. S-ro Arnold Baldwin, 8/9, parolis pri vizitoj al la Reĝa Agrikultura Ekspozicio, donante vivosimilan bildon pri ties etoso kaj precipe pri la t.n. "popola tago".

• **HOBARTO:** Antaŭ monatoj S-ino Lynn Carswell, sekretario de la E-Societo de Launceston, petis la pruntedonon de kelkaj libroj el nia biblioteko. Post diskuto inter antaŭiaj membroj de nia neaktiva grupo ni decidis helpi la grupon de Launceston kaj proponis la transdonon de la tuta biblioteko, kune kun aliaj dokumentoj. Mia edzo, la antaŭa kastisto de nia grupo, fermis la bank-konton, kaj sendis la malgrandan sumon al la grupo en Launceston. Ili danke akceptis la donacon kaj promesis prizorgi la bibliotekon k.t.p. por la posteuloj, por ke la laboro kaj celo de D-ro Zamenhof antaŭeniru.

Tio ĝojigas nin kaj ni estas certaj ke Esperantistoj ĉe la Pacifika Kongreso bonvenigos la grupon el Launceston. Kia bona sperto por nova grupo! Ni en Hobarto esperas, ke ili revenos plenaj de entuziasmo kaj pretaj forte labori por la antaŭenigo de Esperanto.

—Hilda C. Cooper (antaŭa sekretario)

• **CANBERRA:** Mortis je 8-a de julio S-ro William Amies 45-jara. Li estis agrabla kaj entuziasma membro de la E-Klubo de Canberra kaj eks-prezidanto. Li kaj lia edzino Barbara antaŭ kelkaj semajnoj regalas italan vizitanton, kiu alskribis min dum foresto. Bill estis Vic-delegito (Turismo). Li estis teknika instruisto ĉe la Kanbera Teknika Kolegio. Lastatempe la Amies-familio interesiĝis pri "verteranaj aŭtomobiloj". Ili iris al Adelaide por akiri tian aŭtomobilon kaj ambaŭ malvarmumis survoje hejmen. Por malpliigi la riskon Bill eniris hospitalon, sed post 2 semajnoj li mortis pro tumoroj en la brusto. —Noel Gamble.

• **MANLY.** Elstara kunveno okazis 3-an de aŭgusto ĉe la hejmo de S-ino R. Carruthers. La membroj de nia klubo prezentis al Ges-roj Schwerin la libron "Esperanto en Perspektivo", kiel dankesprimon pro ties multjara penado en Manly. Ili danke akceptis "Dumvivan Membrecon". Estis nostalgia vespero por la malnovaj anoj de nia klubo.

Okazis pikniko (17/8) ĉe "Clive, Park" kie la belega vidaĵo trans "Middle Harbour" kaj la kantoj de la birdoj ĉarmis ĉiujn. La fino de la trimestro ĉe la Vespera Kolegio donis oportunon al la membroj distri sin. S-ino Kay Morrison montris bildojn el arĉeloj. Betty Cleminson parolis pri ĉinaj pentraĵoj. La vespero finiĝis per manĝeto kaj babilado en la hejmo de Ges-roj Ross.

Gratulojn al Betty Cleminson, kiu montris diapozitivon kaj tre kapable parolis pri Bali. Ŝi donis interesajn

informojn pri la kutimoj kaj religio de la Balianoj. Estis ĝuinda vespero en la hejmo de Edna Giles.

Komenciĝis konversacia rondo en la hejmo de S-ino E. Ferguson, ĉiun lundon je la 2.30-a. Nepre telefonu Evelyn ce 982-3470. — Edna Giles.

• **SYDNEY:** 21/7 okazis diskuto pri la valoro de interspaca kunlaboro de Usono kun Rusujo. Gastparolanto Eunice Graham el Manly, 28/7, montris lumbildojn pri vidindaj marbordejoj de la mondo, de San Francisco al Kimrujo, de Dubrovnik al Hong Kongo kaj revene al Aŭstralio de Cairns al Sidnejo.

Je 11/8 S-ro David Gould parolis pri viraj modoj dum pasintaj jarcentoj kaj ni konstatis ke viroj agas kiel pavoj.

"Kiel esti feliĉa, eĉ kiel edzo". Jen la temo de bona kaj amuziga prelego de Arthur Cocking (18/8). Unue, elektu taŭgan virinon, prefere de la sama religio kaj vivmaniero. La paro, kiu pregas kune, restas kune. Sed ne elektu iun, kiu estas kopio de vi. Estimu vian edzinon, respektu kaj toleru ŝiajn opiniojn. Ŝi rajtas esti same malsaga kiel vi mem. Elektu, selektu, respektu, konservu kaj amegu ŝin!

Redaktorino kun iom da sperto — tiel Thelma Smith priskribis sin. (25/8) Ŝi menciis 4 virojn: Wre Chandler, kiu petis ke ŝi fariĝu redaktorino de "Telopeo"; Tim Timmins, kiu preskaŭ apopleksiĝis pro la eraroj en la presitaj paĝoj kaj tial nun antaŭe legas la manuskriptojn; Jim Harwood, kiu postelegas la tajpadon kaj Tom Elliott, kiu presas la gazeton. Ludvespero okazis 1/9. Ni demandis nin ĉu orbiti — strangaj respondoj al eĉ pli strangaj demandoj.

"Ascendo kaj falo de D-ro Ivo Lapenna" estis la temo de prelego de Volo Gueltling (8/9). Volo klarigis multajn okazaĵojn, precipe inter D-ro Lapenna kaj diversaj germanaj Esperantistoj. — M. Chaldecott.

• **BRISBANE:** La kutimaj klasoj okazadas ĉiulunde en la klubĉambroj, kaj ĉeestas meznombro dudek membroj. Du aferoj trudas sin kiel la plej gravaj nuntempe: la kompilado de historio de nia societo kaj la praktikado por la kongresa dramo-konkurso, verkita de Trevor Steele.

• **TOOWOOMBA:** Kun bedaŭro ni devas anonci la morton de S-ro Vale Don Pollock, je 24-a de aŭgusto, 65-jaraĝa. Li estis aktiva membro de nia E-Societo; ĉe lia enteriĝo, la pastro menciis lian intereson pri Esperanto.

S-ro Heber Petley feris lastatempe en Townsville kaj kaptis la okazon fari prelegon pri Esperanto en la tiea Eduka Centro por Plenaĵuloj. Malfeliĉe ne

ekzistas taŭga instruisto en Townsville, ĉar la estro de la vesperlernejo estas preta enkonduki Esperanton en la instruprogramon.

Kaprikorna Marbordo: Nia nova sekretario estas S-ino Lyn Tappen, Wilbrahim Street, Zilzie, Q'ld., 4703.

Vizitis nin en aŭgusto Hans Brendel, nova aŭstralia reprezentanto de la Skolta Esperanto-Ligo. Dum sia vizito Hans ankaŭ iris al Rockhampton kaj parolis tie al distrikta kunveno de Skoltestroj.

Skolta Esperanto-Ligo

Kiu ajn volas helpi informi al la Skolta movado (inkl. Skoltina) pri Esperanto kaj la S.E.L., bonvolu skribi al Hans Brendel, 3/119 Kadumba Street, Yeronga, Q'ld., 4104. Kontraŭ \$1 vi povos ricevi "La Skolta Mondo" gazeton entute en Esperanto. Sendu al Hans.

EL LA FEDERACIOJ

Nova Sud-Kimrujo: Je la lasta semajnfino de oktobro (25-a kaj 26-a) okazos Stata konferenco ĉe la Everglades Motelo en Leura, urbeto en la Blua Montaro. Ĝuida loko por la konferenco kaj la plej taŭga dato por rigardi la belajn ĝardenojn.

—Les Scott, Prezidanto.
Viktorio: La Federacio organizis Lud-Vesperon, je sabato, 16-a de aŭgusto. Membroj unue renkontiĝis por la vespermanĝo en ĉina restoracio en Malvern. Post la manĝo ĉiuj iris al la halo de la Sav-Armeo en Union Strato (Malvern), kie bone organizita serio da ludoj ekzercigis la membrojn en la lingvo. La grupoj de Malvern, Melbourne kaj Oakleigh partoprenis. Bonega vespermanĝeto konkludis la vesperon.

A.E.A.-POSTENOJ VAKAS

La nuntempa Sekretario, S-ro Russ Baxter kaj la Kasisto, S-ro Les Scott informas, ke ili ne intencas kandidatiĝi por ĉi tiuj postenoj por la venonta dujara periodo. Ili eksiĝos ĉe la Aŭstralia Kongreso en Melbourne.

S-ro Baxter servas la Asocion dum kvar jaroj kaj S-ro Scott dum ses jaroj kaj ili juste kredas, ke ili meritas ripozon. La komercaj aferoj de Russ bone kreskas kaj pro tio kaj ekde nun li ne havos la tempon por plenumi tiun gravan taskon. Lastatempe S-ro Scott komencis okupiĝi pri speciala komerca dungado kaj, kun aliaj flankokupoj, ne povos daŭrigi sian Esperantan laboron.

La Estraro vokas volontulo(j)n por la postenoj kaj bonvenigas la nomo(j)n de Esperantistoj, kiuj havas la kompetenteco kaj instigon kaj dediĉon por bone helpi la movadon en ĉi tiuj gravaj fakoj.

—Les. V. Scott.

PRESOFICISTO

Mi petas ke ĉiuj pensas pri tiu afero. Mi ne povas agi kiel presoficisto dum la venontaj du jaroj. Fakte, mi faris malmulton dum la pasintaj 18 monatoj. Do, mi ripetas — antaŭ ol vi iras al la 20a kongreso en Melbourne, pripensu zorge pri nova presoficisto.

—M. Chaldecott.

NIA HISTORIO

No. 7. GEORGE COLLINGRIDGE, 1847 - 1931

George Alphonso Collingridge de Tourcey, pli ĝenerale konata en Aŭstralio kiel Collingridge (sen "de Tourcey"), estis fama kiel artisto kaj verkisto, kaj tiurilate lia biografio troviĝas en la "Australian Encyclopaedia" — la sola esperantisto, kiu gajnis tiun honoron. Sed la "Encyclopaedia" erare informas nin, ke li starigis la unuan Esperanto-klubon en Aŭstralio. Fakte, li fondis en 1908 la Gosford Esperanto-klubon, kiu havis 17 membrojn. George Collingridge estis la Prezidanto kaj P. J. Holdsworth, la Sekretario.

Li naskiĝis en Godington Manor, Oxfordshire, Anglujo, 20/10/1847, kaj mortis en Sidnejo, Aŭstralio, 1/6/1931, aĝa 83.

En 1853, lia familio iris en Francujon kaj Collingridge edukigis ĉe la jezuita kolegio en Vaugirard, Parizo. En 1863, li komencis la studadon de arkitekturo, kaj ankaŭ fariĝis meti-lernanto en lignogravurado. Li konatiĝis kun la pentristo Corot, kies sola lernanto li pretendis esti.

En 1867, li aliĝis al la Papaj Gvardioj por batali kontraŭ Garibaldi. Li revenis al Parizo en 1869, kaj baldaŭ poste iris al Londono, kie li estis gravuristo por la "Graphic" kaj la "Illustrated London News."

Ankoraŭfoje li estis en Parizo, 1872-1879, tiam — en 1879 — li elmigris al Aŭstralio, kie li laboris laŭvice por la "Illustrated Sydney News", la "Town and Country Journal" kaj la "Sydney Mail". Li ankaŭ faris kliŝojn por la "Picturesque Atlas of Australia".

Kune kun sia frato, Arthur Collingridge, li fondis la Art-Socion de Nov-

Sud-Kimrujo, kaj instruis mallongan tempon en la Sydney Technical College.

Li interesiĝis pri la Historio de Aŭstralio, kaj eldonis plurajn broŝurojn, kiuj fariĝis la bazo de lia libro, "La Malkovro de Aŭstralio".

Aliaj verkajoj (ĉiuj en la angla lingvo) estis "Alice en Unu Kara Lando" (1922) kaj "Gi" (1924), kiu ĉefe estas kolekto da ligno-gravuroj.

Sendube, li estis unu el la plej fruaj esperantistoj en Aŭstralio kaj fondis la unuan Esperanto-klubon en Nov-Sud-Kimrujo, sed ŝajne li neniam fariĝis sperta en la lingvo. Li estis la sola esperantisto el N.S.K., kiu ĉestis la Unuan Esperanto-Kongreson en Adelajdo, oktobron 1911.

Li edziĝis kun filino de T. C. Mackenson, kaj postlasis tri filojn kaj unu flinon.

Estas strange, ke ne aperis nekrologo pri li en la "Suda Kruco" por 1931. Lia nomo lastfoje aperis en tiu gazeto en N-ro 97, 10/7/1928 en listo de aliĝintoj por tiu jaro. Post tiam—silento. Eble, li fariĝis tro maljuna por ĉeesti kunvenojn aŭ por partopreni en esperantistaj aferoj, kaj do, forpasis sen tio, ke nova generacio da esperantistoj sciis pri li. Bedaŭrinde, ke ni tiel baldaŭ forgesas la meritplenajn laborantojn, kiam ili maljuniĝas.

En "The Australian Esperantist", N-ro 6 oktobron 1908, eldonita de Dr. Barrington, ni trovas la jenan informojn:

"Nova Gazeto. La Gosford Esperanta Klubo post ne longe publikigis novan esperantan gazeton, "Verda Stelo". Manskribota, kun allogaj kolorigitaj bildoj, premioj, k.t.p. Ĝi aperos ne regule, sed je nefiksitaj datoj. Prezo por 5 ŝilingoj por 10 sinsekvaj ekzempleroj. Sin turni al G. Collingridge, Hornsby, N.S.K."

—I. T. MADDERN

RECENZOJ

Gizela kaj Roberto: 5 Skeĉoj de Bukar. 32p. Edonis Dansk Esperanto-Forlag. A.E.A. Libro-Servo (Sro T. Elliott) Aŭstralio prezo 75 cendoj.

Ĉiam tre valoraj estas rimedoj plibonigi la parolan uzon de nia lingvo. La nuna libreto, unu el pluraj kiujn eldonis Dansk Esperanto-Forlag en la lastaj jaroj estas, do, tre bonvena.

En ĉiuj kvin skeĉoj rolulas po du personoj, kvankam en la unua kaj plej-

longa "Nutradistiko" unu virino ludas du rolojn. En tri aliaj skeĉoj (unu mallonga kaj du iom pli longaj) la sama geedza paro partoprenas. La unuaj kvar skeĉoj havas karakteron pure distran. La kvina estas io alia. Mi trovas ĝin nekontentiga. Temas pri du judaj virinoj en Vieno en la dudekaj jaroj de la nuna jarcento. Ili diskutas farbiston —la estontece fifaman Hitler. Sed la historia fono de la drameto ne estas ĝusta! Hitler translokiĝis al Munich jam en 1913 kaj ek de 1920 plene aktivis en la organizado de la Nacisocialistoj. Cetere, mi trovas la temon evitinda en neserioza verketo. Tamen, sendube iuj ŝatos la dramecon de ĉi tiu mallonga peco.

Enŝteliĝis kelkaj eraroj. Unu ne korektita estas "insolanta" (Devus esti "insolenta"). Enestas kelkaj nekutimaj esprimoj: p.15 hupo = korno; p.16 pansajoj = bandaĝoj (dressing) p.22 "meti la okulvitrojn" estas francismo — devus esti "surmeti".

Else kaj Bo de Rigmor Christopher-sen. Tradukis Gudrun Riisberg. Desegnis Thora Lund, 40p. broŝ. Eldonita de Dansk Esperanto-Forlag. A.E.A. Libro-Servo. Aŭstralio prezo 90c.

La libreto enhavas du rakontojn por junaj infanoj. La unua "Else Butikumus" temas pri okjara knabino, la dua "Bo Forgesas" pri sepjara knabo.

La Eldonisto asertas ke jam por la interesaj desegnaĵoj de Thora Lund li decidis ĝojigi la esperantajjn geknabojn per la libreto. Certe ili estas tre allogaj, sed mi trovis la rakontojn mem tre ĉarmaj ankaŭ. Ili enhavas iom da moralinstruo, sed tio ne tro sin trudas. En la unua, la malgranda Else, sek-vante la konsilon de la instruisto Jensen, deziras esti helpema al la najbaroj, sed fine ŝi bezonas la helpon de la instruisto mem kiam ŝi entreprenas tro da butikumaj taskoj samtempe. En la dua rakonto Bo forgesas, forgesadas. Sed kun la helpo de la gepatroj li lernas esti pli atentema. Mi suspektas ke ĉi tiu ĉarma, bonstila volumeto plaĉas al multaj plenaĝuloj ankaŭ. Ĝi certe plaĉas al mi.

—R. McG.

CHEERIOS: News Digest sends a cheerio to the "Awakening" Esperanto Society of Sumen, Bulgaria. It has been awake for seventy years. Greetings also to the "Green Asteriod". It's not a pop group, but is the newest Esperanto Club in Finland.

NEWS - DIGEST

RUSSIAN ROUND: The members of the Ufa Esperanto Club are trying to build up the number of Esperantists in the U.S.S.R. with a newspaper campaign.

They report that a large number of enquiries have come in. Each enquiry is sent a copy of the Russian-Esperanto textbook by Boris Kolker.

Quite a few have signed on for the Ufa Esperanto Club's correspondence course. The club is concentrating on the Northern Urals, Eastern Siberia, the Chukhotsa Peninsula, and Russia's own "Far East".

TURKEY TALKING: The Turkish Esperanto Association was founded on May 11th this year. It is headquartered in Istanbul.

POLES REACH OUT: The Polish Esperanto Association in Bydgoszcz is running a mammoth recruiting campaign. Called "Trifoje 1000", its organisers hope to gain 1000 ordinary members, 1000 supporting members, and 1000 students.

DIPLOMATIC SERVICE: Eriko Sunardo has been using Esperanto for a quarter of a century. Mr. Sunardo is the First Secretary of the Indonesian Embassy in Vienna.

SAY AGAIN: Cheer up kids, even professors make howlers. During a broadcast in Germany, Dr. Wolfram Wilss was asked about the international language. Here is a transcript.

Q: "Who invented Esperanto?"

A. "Comenius".

Q: "And how many people speak it?"

A. "I can't answer that; but certainly not as many as they say".

Dr. Wilss is from the Interpreters' Institute of the University of Saarbrücken.

ESPERANTISTS' LIBERATION: A new feature at the Copenhagen World Congress was the "Free Time" segment to let the congress members have a look at their congress city without having to skip sessions. They loved it.

SHARE THAT JOKE: Italian Esperantist Maurizio Lazzarini is compiling an anthology of international rib-tickers. If you can share an Australian joke with him, then mail it off to Via Villalunga 288/a, C.A.P., I-40060 Osteria Grande, Bologna, Italy.

TONGUES AND LUNGS: From Spain comes a report of a regular Esperanto radio programme. It is every Wednesday over Radio Sabadell and is called "Esperanto la Lengua Internacional".

And from the Pulmonary Diseases Hospital in Szolnok, Hungary comes news that an Esperanto Circle amongst the medical staff has been set up.

OLE FOR OLAVI: Here's one for the Guinness Book of Records. So far this year, the Finnish Esperantist Olavi Kalevaa has written 500 letters in Esperanto to Radio Poland.

CERTIFY THE DELEGATES: As if it wasn't enough to qualify for duty-free hooch, now it looks like UEA's "Consuls" will have to be certified. At the Copenhagen Congress, Dr. P. Denoel and 42 "Delegitoj" kicked around a proposal for UEA "Consuls" to have to pass a test of competency.

POISSY PLASTERED: The night before the first Paris Regional Esperanto Conference in Poissy, some of the 65 Esperantists taking part pasted up posters throughout the town advertising the Conference.

SCIENTISTS AGREE: The World Federation of Scientific Workers has given in to lobbying from Esperantist scientists in Bulgaria and Yugoslavia and has agreed to publish its magazine "Science World" in Esperanto as well as in four national languages.

The successful lobby was led by Prof. V. Pevski.

PAPAL BLESSING: Speaking in public audience, Pope Paul blessed 350 Catholic Esperantists in St. Peter's Square last August saying, "May the spirit of the Jubilee guide you in the instigation of brotherhood and understanding among the peoples of different language."

The Esperantists were there for the Jubilee celebrations and for the 36th Congress of IKUE.

NEWS DIGEST: Credits this time to HdE, PP and IEMW.